

SÁNDOR SZATHMÁRI KAJ LIA ĈEFVERKO:
"VOJAĜO AL KAZOHINIO" .

1. Lia vivo

Sándor Szathmári naskiĝis en la jaro 1897, en la urbeto Gyula. Lia patro estis oficisto, ofte translokigita. Tial Szathmári vizitis la lernejon komence en Alsókubin (nun Dolny Kubin, en Ĉekoslovakio), poste mezlernejon en Lugos (nun Lugoj, en Rumanio). En ĉi tiu medio jam en sia infanaĝo povis observi la naciajn antagonismojn, kiujn li neniam povis kompreni. Tiuj spertoj donis al li la unuajn instigojn por fariĝi esperantisto. En 1915 lia familio translokiĝis al Buda-peŝto. Szathmári studis en la mekanika fakultato de la Teknika Universitato. Post la akiro de diplomo li fariĝis inĝeniero en la fabriko "MÁVAG". Ĉi tie li okupiĝis pri maŝinprojekto ĝis kiam li fariĝis pensiulo.

Dum la universitataj jaroj, kaj ankaŭ poste, Szathmári multe interesiĝis pri la sociologiaj kaj natursciencaj demandoj. Lia inter-

nacia pensmaniero frue komencis elformiĝi. Havis 12 jarojn, kiam unue prenis la gramatikon de Esperanto en la manojn. Post 8 jaroj li rekomencis okupiĝi pri Esperanto, tralegante la verkon de Tolstoj: "Tri rakontoj". Pere de la legado li bone alproprigis la lingvon. Foje Julio Baghy demandis lin: "Kial vi esperantiĝis?" Sándor Szathmári respondis tiel: "Mi estas esperantisto ekde mia naskiĝo". Ili ambaŭ konstatis, ke esti esperantisto havas pli altan, pli riĉan senson ol esti adepto de internacia lingvo: ĝi estas destino, misio.

La suferoj de la mondo dum la unua mondmilito malesperigis kaj ekpensis lin pri la sorto de l' homaro. Post la milito ankaŭ Szathmári, kiel granda parto de la hungara intelektularo esperis la pacon; li esperis, ke la travivitaj teruroj seniluziigis la homaron. Li atendis la kunlaboron, kunsenton inter la popoloj.

La mondekonomia krizo kaj la disvastiĝo de l' faŝismo montris, ke lia espero estas iluzio. La senespereco estigis en li pesimismon. La ĉiam pli videbla ekĝermo de la dua mondmilito konvinkis lin pri la senespera stato de l' homaro. Li diris ĉi-rilate:

"En mia animo ĉiam pli lumiĝis la praveco de la verko de Madách: La Tragedio de l' Homo, kies rezulto estas, ke la homo senĉese luktas kaj esperas pli bonan estonton, kiu tamen neniam alvenas. La homaro ĉiam suferigos sin mem. Same lumiĝis al mi grandioza idea senco de Swift: la homa animo havas internan, strukturan difekton, kio malebligas al ni vivi perfektan vivon." (Epilogo al Maŝinmondo, p.178.).

En la jaro 1932 Péter Illésy demandis lin, kiun titolon donu al sia bildo: sur la pentraĵo supre sidis Budho laŭ lotuspozo, kaj levante sian montrofinĝron, instruis. Apude Jesuo predikis per etenditaj brakoj. En la centra parto de la bildo kuŝis Sfinkso, duone kovrita per polvo; kaj sube la malkreskanta Luno. Szathmári proponis, ke la titolo estu: "Vane".

Verkista kariero

En la sama jaro li ekprovis formuli siajn pensojn. De 1932 ĝis 1934 li verkis trilogion kun la titolo: "Vane". La tri partoj okazis

laŭvice en la pasinto, en la estanto kaj en la estonto. La rolludantoj estis la samaj homoj, la samaj sociaj tipoj, nur en aliaj medioj, konvenaj al la epokoj. Iliaj sortoj estis ankaŭ la samaj. La socio mortigas la entuziasmon de la heroo, kaj la vivo daŭras plu, la mondo rotacias plu laŭ la eterna monotona sameco. Ĉi tiu trilogio ne aperis.

En 1935 Szathmári komencis verki novan romanon: la "Vojago al Kazohinio", Gulivera aventur-romano. Li tuj komencis verki la romanon esperante, ĉar venis al li la ekkono, ke la ĝenerala humana tendenco antaŭdestinas la libron al Esperanta eldono.

La elstara satira romano estis preta en Esperanto (kaj parte ankaŭ hungare) jam en 1938. La eldonejo Literatura Mondo en Budapeŝto akceptis ĝin, kaj Kálmán Kalocsay reviziis kaj korektis la tekston laŭ lingva vidpunkto. La disvastiĝo de l' hitlerismo malebligis la pluan ekziston de la menciita eldonejo, tial en 1939 iu amiko elmigranta al Francio kunportis la manuskripton al SAT, kiu jam tiutempe inklinis eldoni ĝin. Sed la milito renversis ĉiujn planojn.

Szathmári serĉis eblecon por hungarlingva eldono. Pluraj eldonistoj interesiĝis, sed li devis submeti la manuskripton al la cenzo. Fine, la libro aperis en kripligita formo en 1941, en 3500 ekzempleroj.

Post la milito aperis ankoraŭ tri eldonoj. La dua, en 1946 enhavis plurajn novajn ĉapitrojn; la tria aperis en 1957, kaj la kvara en 1972.

SAT eldonis la romanon en 1958, en Parizo, ĝi estis la originala, Esperanta verko.

Post la dua mondmilito Sándor Szathmári retiriĝis de la literatura agado, nur ekde 1956 komencis denove verki.

La duono de lia verkaro estas en Esperanto. Jam antaŭe li publikigis plurajn novelojn en "Belarto", "Nica Literatura Revuo", "Norda Prismo", "Sennacieca Revuo", ktp. Post 1956 en la Esperantaj literaturaj revuoj unu post la alia aperas liaj noveloj, rakontoj, recenzoj, rememoroj kaj artikoloj. Ekde 1965 li estis ĉefkunlaboranto de "Hungara Vivo", kie aperis pluraj liaj beletristikaj tradukaĵoj, unuavice el la verkoj de Karinthy.

Li diris pri Frigyes Karinthy:

"Mi rigardas lin mia spirita, anima patro. Li estis la unusola hungara verkisto, kiu ne rakontis, sed prezentis kaj kritikis la realaĵon. Li estis la unua homo, kiu tute komprenis la Kazohinion."

Szathmári en 1958 tradukis el Esperanto hungaren la romanon de Cezaro Rossetti "Kredu min Sinjorino". En 1964 aperis lia originala novelaro "Maŝinmondo"; hungare ĝi aperis en 1972.

Bedaŭrinde, ekde kelkaj jaroj Szathmári ne povis labori, pro lia grava malsano. Li mortis la 27-an de septembro de 1974.

2. Lia loko en la hungara kaj Esperanta literaturoj

Sándor Szathmári okupas tre originalan lokon kaj en la hungara, kaj en la Esperanta literaturo.

La Esperantaj revuoj kaj eldonejoj donis al li azilon ankaŭ tiam, kiam la hungara literatura vivo preteris lin. La noveloj de "Maŝinmondo" senescepte aperis la unuan fojon en Budapeŝto, kaj la nomo de Szathmári estis bone konata inter esperantistoj.

"La verkoj de Szathmári ne estas puraj ludoj de la imago pri la estontaj mirakloj de la scienco, ili estas meditado super tempoj, kiujn la aŭtoro pritraktas sufiĉe originale kaj alloge, sed kiuj okupadis longe la homan menson kaj certe ĝin okupos ankoraŭ longe. La legado de la verkoj de Szathmári ne estas nura distro, sed potenca instigo al pensado." (Michel Duc-Gonias)

La fama poeto, William Auld skribas pri li:

"Sándor Szathmári estas unu el la grandiozaj satiristoj de la nuntempa mondo, kiu okupas lokon samnivele apud siaj grandaj kaj mondkonataj fratoj (kiuj cetere estas liaj plej ŝatataj verkistoj) Swift, Wells, Anatole France, Madách kaj Karinthy. La fakto, ke li verkas pliparte en Esperanto, estas ĉefatuto por nia kulturo, kaj

sekve por nia afero, kiun siatempe ni esperetle komprenos meti en la ludon. Tiujn du propoziciojn mi skribas senpardonpete, malgraŭ tio, ke nia esperantista publiko ne tro ŝatas rekonii siajn valorojn kaj preferas mildigi siajn pretendojn per ĉiaj seoj kaj sedoj kaj tame-
noj." (Auld, pri la originala literaturo kaj pri la verkoj de Szath-
mári, Revuo Esperanto, ja., 1966.)

Sándor Szathmári estis esperantista verkisto. Li diris pri
Esperanta kulturo:

"La Esperanta kulturo povas esti evoluigata, ĝi devas esti evo-
luigata, kaj ĝi ankaŭ per si mem evoluas, ĉu ni volas, ĉu ne. Mi ver-
kis proksimume la duonon de miaj verkoj en Esperanto, sed ili ĉiuj -
ankaŭ la hungare verkita parto - estas nepre pli Esperantaj, inter-
naciaj, ol tipe hungaraj, ja neorientita leganto malfacile divenus,
ke la aŭtoro estas hungaro." ("Mi ĉiam skribis pri la homo", interv-
juo de Vilmos Benczik, Hungara Vivo, 4, 1973.)

Kiagrade Sándor Szathmári estas hungara verkisto? Ĉu lia verkaro
apartenas ankaŭ al la hungara literaturo?

Li estas hungaro, li verkis en Hungario: lia verkaro estas par-
to de la hungara literaturo. Li estas unuavice filozofo, meditulo,
kaj duavice beletristo.

La baza penso de liaj verkoj: la homo havas en siaj manoj alt-
nivelan teknikon, kiun li mem kreis, sed liaj propraj biologiaj ecoj
evoluis tre malmulte. La homaro tiel nekapablas al vere harmonia
vivo.

Li simbolas kaj interpretas la homan vivon per amareta rezigno,
sed lia amareco ne estas la amareco de la senespera elreviĝo. La ver-
kisto esperas, ke la homoj trovos la menieron vivi logike. Szathmári
vidas, ke la interhoma batalo ne estas bazo por la homa ekzisto, eĉ
ĝi malhelpas la ekziston kaj evoluon, kiuj baziĝas sur la kunlaboro.

Bedaŭrinde li estis en troa grado pesimisma, li pensis, ke la
kunlaboremo preskaŭ tute mankas al la homo; dum la lasta jardeko la
tekniko multon evoluis, sed la homo mem preskaŭ neniom.

En postparolo de "Maŝinmondo kaj aliaj fantaziaj rakontoj"
(hungarlingve, en 1972), Dezső Keresztúry skribis:

"La apero de ĉi tiu libro de Sándor Szathmári ĝustigas maljustaĵon. Ĝi ne nur prilumas longe ombritan parton de la tradicio de hungara sciencfikcia literaturo, sed, eĉ se kun iom da malfruo, honoras maljuste ignoritan verkiston. Ĝi konigas pruvon al la hungara publiko pri tio, kion la esperantistaj legantoj jam delonge sciis, nome, ke Sándor Szathmári ne estas "unulibra verkisto"."

En la hungara literaturo ne estas tradicioj de la sciencfikcia ĝenro. Escepte de kelkaj verkoj de Karinthy ("Vojaĝo en Faremidon", "Capillaria", ktp.) kaj la "Elza piloto" de Babits, grava hungara verkisto ne praktikis ĉi tiun ĝenron. Szathmári protestas kontraŭ la epiteto "sciencfikcia", ĉar li rigardis sin satiristo. Fakte, li estis satiristo, tamen en liaj verkoj ludas gravan rolon la scienca fantazio.

3. Vojaĝo al Kazohinio

Eldonoj

La aŭtoro komencis verki la romanon en 1935. Post plurfoja prilaboro kaj plibonigo ĝi aperis nur en 1941. La unua eldono aperis ĉe la eldonejo de Sándor Püski, nomata "Magyar Élet", ("Hungara Vivo"), kadre de la serio "Bólyai-könyvek". Pro la mondmilita politika situacio, la libro povis aperi nur en tre kripligita formo; la aŭtoro devis ellasi plurajn ĉapitrojn. (Ĝuste la plej bonajn partojn.) Li devis forlasi la priskribon de la buku (milito), kaj la konversacion de Gullivero kun Zolema. (Ĉi tiu ĉapitro estis suspektita kiel pornografieca.) Tamen, la kripligita romano rapide elĉerpiĝis.

La dua eldono aperis post la liberiĝo, en 1946, same ĉe la eldonejo "Magyar Élet", en la originala formo, eĉ la volumo pliampleksiĝis per du novaj ĉapitroj (13-a kaj 14-a). La aŭtoro skribis al ĝi klarigan ĉapitron kun la titolo Kanto de la povra histriono, ĉar multe da legantoj miskomprenis la celon de la libro.

En ĉi tiu klariga ĉapitro la aŭtoro dividas la evoluadon de la pensoj en tri etapojn. La unua etapo estas la verkoj de Swift. La fama angla aŭtoro kritikis kaj ironiis la tiaman socion. Li mokis la servilajn homojn, rekonante la stultecon de la homa ekzistado. La dua etapo estas la granda dramo de Imre Madách, "La Tragedio de l'Homo", en kiu la verkisto divenas la tezon de la eterna homa malfeliĉo. Szathmári diris pri Madách: "Miaj verkoj havas plurajn parencojn en la mondliteraturo. Tia parenco estas ekzemple La Tragedio de l'Homo de Imre Madách, kiun mi konsideras unu el la plej grandaj verkistoj de la mondliteraturo. En lia dramo mi renkontis miajn proprajn pensojn, kaj tio kompreneble firmigis miajn konkludojn." ("Mi ĉiam skribis pri la homo", intervjuo de V. Benczik, Hungara Vivo, 4/1973.) La tria etapo estas la "Kazohinio", en kiu Szathmári klarigas la kaŭzon de la eterna malfeliĉo. Li diras, ke la socio de la hinoj estas tia, kiun oni devus atingi, sed oni tamen ne povas atingi, ĉar ne ebligas tion niaj genoj. Dum la lastaj jardekoj la diferenco inter la evolugrado de la Homo kaj tiu de la Tekniko multe kreskis. (Ĉi tiujn vortojn Szathmári diris al mi rekte, kelkajn monatojn antaŭ lia morto.)

La tria eldono aperis nur en 1957, ĉe la eldonejo "Magvető". Ĉi tiu eldono estis la sama, kiel la dua, sed Szathmári forlasis la ĉapitron "Kanto de la povra histriono".

En februaro de 1958 la Sennacieca Asocio Tutmonda en Parizo eldonis la libron esperantlingve. (La esperantlingva estas tute la sama, kiel la tria, hungara eldono.) Ĝi rapide elĉerpigis.

La kvara hungara eldono aperis en 1972, prizorgis ĝin la eldonejo "Magvető". La aŭtoro estis malkontenta, ĉar liajn interparoladojn, kiujn li estus volinta vidi en la nova volumo, oni ne akceptis. Kvankam li ne multon faris por la eldono, tamen tre ĝojis, kiam aperis lia libro.

Kritikemo kaj satiremo

La plej valora kaj plej alloga elemento de la verko estas ĝia konsekvencega logiko. La desegno de socio de la hinoj montras, kiu estas la vojo de la natura evoluo, kien oni povas alveni, se oni

povus ellasi la "ĝenajn flankajn cirkonstancojn" (kiel la animon, emociojn, ktp.).

Szathmári prezentis la vivon de la hinoj kontraŭ la vivo de la belohinoj. La unua parto, en kiu la aŭtoro prezentas la "hinan vivon", estas filozofia-socia utopio, la dua parto, la prezentado de la "behina vivo", amara socia satiro.

La verkisto atakas kaj vipas la absurdaĵojn de la homa socio:

"La vivo de la hinoj estas ,pozitiva utopio! ja laŭ mia opinio la homaro devus evoluigi sin mem por fariĝi tia. Mi ne miras, ke tiu vivo por la nuna homo povas ŝajni monotona, senkolora, sed ne ekzistas por la homo alia eblo de kunvivo kun la perfekta tekniko.

La hinoj trovis la manieron vivi logike, do laŭ la postuloj de la tekniko. La tekniko traretis nian vivon, ni ricevis kaj ricevos de ĝi multajn avantaĝojn, kaj por tiuj avantaĝoj ni kompreneble devas pagi, rezignante pri nia maldisciplinemo, konkursemo, ktp. Do, per la prezento de la vivo de la hinoj mi tute ne volis fortimigi la homojn, male, mi volis prezenti al ili, jen, tiaj vi devas fariĝi, se vi volas konservi la homan vivon sur la tero." (Hungara Vivo, samloke.).

Gulliver diras en la unua ĉapitro pri la itala ĉefpastraro: "Precipe profundan impreson faris en miaj animoj la entuziasma ofero de la itala ĉefpastraro, kiam ili donacis al la altaro de la patrio sian monon, valorajn pastrobastonojn kaj juvelŝtonajn orkrucifiksojn por aĉeti tankojn, bajonetojn kaj brulbombojn por la noblaj celoj. Ili ne ĉesis kuraĝigi per stimulaĵoj la kamparanojn, la spicistojn, la pasteĉfritistojn, fiŝistojn, doklaboristojn, almozpetulojn, ŝafistojn, glaciaĵistojn kaj kandelfaristojn sen ras- kaj klasdiferencoj, ke ili iru en la tranĉeojn por disvastigi inter la nigruloj la kulturon kaj la puran kaj kristanan civilizacion, dum la pastraro senĉese preĝos hejme al la Savinto kaj al la Sankta Virgolino de Loretto, por ke la favoro de la ĉielo subtenu iliajn armilojn por ilia nobla destino." (Unua parto, 14-15.p.).

La aŭtoro kritikas kaj primokas la profitavidan aspiron de la nacioj:

"Estas afero evidenta kaj ĝenerale sciata, ke la oferplena, sed nobla laboro, liberigi la tropikajn popolojn kaj disvastigi la kulturon ĉiam estis la honora tasko de Anglio. Por pruvo estas sufiĉe menciiti la multajn koloniojn de Malantaŭa Hindio ĝis la buroj, kiujn popolojn liberigis mia patrio el la subpremo per la kosto de malfacilaj bataloj. Kaj, kvankam anglan ĝentilhomon ne interesas la materiaj rilatoj de la aferoj, tamen ni ne povas prisilenti tiun mian opinion, ke Italio verŝajne influis en sia decido krom la kulturo kaj la libereco ankaŭ la kafoplantaĵoj kaj naftokampoj de Etiopio.

Tion la itala gazetaro kompreneble akceptis kun granda malkonsento, asertante, ke nian patrion influis eble, krom la menciitaj celoj, ankaŭ la posedavido, kaj ke Anglio envias al la malriĉa itala popolo eĉ tiujn kelkajn abisenajn minejojn kaj petrolfontojn, kiuj - kvankam ili tute ne interesas la italojn -, tamen estas menciindaj, kiam temas pri angloj." (Samloke, 15.p.)

Szathmári per akra satiro prezentas la armadon kaj la militon:

"Mia severa decido estas persisti ĉe la objektiva vero kaj ĉiam laŭtigi mian modestan voĉon, kiam ajn trafas neinda kalumnio mian patrion, ĝiajn militŝipojn, tankojn, aeroplanojn kaj ĝenerale ĉiujn grandiozajn kreaĵojn, kiuj distingas la homojn de la rabobestoj." (Samloke, 16.p.)

En la unua parto de la interesa kaj konsterna romano ĉe la hinoj ni renkontas la efektiviĝintan komunismon en sia tuto. La materialateknika nivelo estas alta, evoluinta, la homoj estas tute liberaj.

Regas vera demokratio, demokratio laŭ la principo de la egaleco. Ĉe la hinoj estas disciplino kaj harmonia vivo. La agadojn de la hinoj determinas la racio, kiu ĉe sigas ĉian socian konstruaĵon, kiel la moralo, filozofio, politiko, religio, arto kaj literaturo.

"Kazoo" kaj "kazi"

La hinoj konas du "ĉefkonceptojn": la "kazoo"-n kaj la "kazi"-n.

"Neniu el ili povas esti tradukita al iu ajn Eŭropa lingvo.

Nome, se ili diris pri iu afero, ke 'ĝi estas kazoo', tio signifis sam-specan, kiel ĉe ni dirante: 'ĝi estas laŭleĝa, justeca'. Sed nur ĉirkaŭe.

Kazoo estas inter la kavalireco, lojaleco, toleremo, memfido kaj justeco, sed estas adekvata al neniu el ĉi tiuj. Ĝi signifas ian ĝeneralan justeman intencon, sed estas tradukebla per neniu vorto. Ĝi estas severe matematika koncepto por la egaleco de la servado kaj reservado. Kiel ĉe ni estas la fizika tezo pri la agado kaj reago.

Ekzemple, se iu, kiu faras pli malfacilan laboron, manĝas ankaŭ pli multe, tio estas por ili kazoo. Se iu tial manĝas pli multe, ĉar lia stomako deziras multe, ankaŭ tio estas kazoo. Se la malsanulo, kiu ne laboras, deziras pli delikatajn manĝaĵojn, ankaŭ tio estas kazoo.

Ankaŭ tio estas kazoo, se iun minacas danĝero, kaj la aliaj, lasante siajn laborojn, helpas al li, sed ĝis kiam li fakte bezonas helpon.

Kazoo estas la klara prudento, kiu vidas antaŭ si, laŭ matematika rektlinio, kiam kaj kiel ĝi devas ion fari, por ke la individuo akiru la plej altan bonstaton per la socio. Do, racie dividi la laboron, ripozon, dormon, sporton, manĝadon, konduti al niaj bonfratoj tiel, ke ĉiu produktu pli multe, tamen sen malutilo de la sano. Se iu laboras malpli multe, ol li kapablas, tio jam ne estas kazoo, ĉar la mankantan parton devas plenumi alia, kiel pluslaboron, kaj tio estas farebla nur per korpa malutilo.

La kazoo havas ne individuan, sed komunan, ĝeneralan sencon: kio por aliaj ne estas kazoo, tio ne estas kazoo ankaŭ por mi.

Strange, la kazoo ampleksas ankaŭ la individuan kapablon. La pli kapabla homo pli produktas por la sama servo. Ĉi tio ŝajnas ĉe ni maljusta, sed ĉe ili ĝi estas same memkomprenebla, kiel tio, ke la pli perfekta maŝino devas pli produkti per la sama hejtmaterialo.

La kazoo ampleksas ankaŭ la helpon al la homfrato, kiu tion bezonas, ĉar ĝi havas ne individuan, sed ĝeneralan sencon. Se estus necese, haltus la laboro de la tuta urbo por savi unusolan homon. Kaj estas plej mirinde, ke la kazoo havas nenian sentimentan karakteron." (Samloke, 48-49.p.)

La antitezo de "kazoo" estas "kazi".

"La kazi estas ekzemple, se iu elprenas novan vestaĵon el la magazeno, kiam la malnova ankaŭ estas uzebla. Aŭ, se iu malhelpas la agadon de sia homfrato sen ia deviga kaŭzo, ekzemple superflue parolas pri temoj, kiuj nek al li, nek al la alia signifas ian utilon.

La kazoo estas la efektivo de la ekzistanta mondo. Kaj inverse, la kazi signifas ne malmoralecon, pekon aŭ maldecon, eĉ ne malĝustan mondkoncepton, sed ion tiaspecan, kian ĉe ni la vorto 'absurdo', do kio kontraŭdiras al la fizikaj faktoj." (Samloke, 52.p.)

La aŭtoro dividas la homojn laŭ iliaj kvalitoj en tri klasojn: hinoj, belohinoj kaj behinoj.

"Ili nomas sin hinoj, kio eble konformas al la vorto 'homo', sed kiel ĉiu alia vorto, ankaŭ ĉi tiu havas interligon kun intencoj kaj celoj, kiel la leganto baldaŭ vidos. Ĉar se ies konduto ne konformas al la tezoj de la kazoo, tiu jam ne estas nomita hino, kaj por ties nomo ili havas diversajn vortojn laŭ tio, ĉu li faras la kaziajn agadojn el mallerteco, aŭ nevolulo. La mallertuloj estas nomataj belohinoj kaj tre interesa estas ankaŭ ilia opinio pri ĉi tiuj. La koncepto de la belohinoj proksimume konformas al tio, kion ni signas per la vorto 'neinstruata'. Do, al ĝi apartenas la infanoj, kaj kiuj komencas novan profesion. Ili estas senditaj al lernejoj por esti edukitaj, sed tie oni apenaŭ uzas devigon kaj eĉ tion nur en la unuaj jaroj de la infanaĝo. Nome, ili havas la konvinkiĝon, ke per klara cerbo neniu faras kaziaĵojn.

El tio sekvas, ki ilia edukado radikale diferencas de tiu ĉe ni, ĉar dum ĉe ni la ĉefa celo de la lernejo estas eduki la infanon fariĝi virta kaj honesta ŝtatano, por ke lia spirito estu inklina al la belaj kaj noblaj aferoj, inter ili ĉio ĉi estas nekonata koncepto kaj la lernejo estas nenio alia, ol la fontoj de fizikaj, kemiaj, higienaj kaj teknikaj scioj." (Samloke, 51.p.)

La behinoj estas, kiuj scias la natursciencajn efektivaĵojn kaj tamen faras kaziajn aferojn. Behino estas, "kiu laboras pli multe, aŭ

malpli multe, ol li povas sen lia malutilo, kiu formangas la manĝaĵon de la alia aŭ donas sian al la alia (!) kvankam li mem estas pli malsata ktp." (Samloke, 52.p.) La vorto 'behin' unuigas en si du konceptojn, sendiference, ĉu la behino malprofitigas sin mem, aŭ la alian.

La hinoj rigardis la behinojn 'nehomoj', kvazaŭ temus ne pri homoj, sed pri alispecaj naturkreaĵoj. La behinoj estis fermitaj tute aparte, de kie ili neniam rajtis elveni al la homa publika vivo.

La hinoj

La nomo de la lando, "Kazohinio" signifas: la lando de la homoj, kiuj konas la puran esencon de la homa estado.

En la unua parto Sándor Szathmári prezentas la vivon de la hinoj.

Pluraj kritikistoj pensis tiel, ke la unua parto de la Kazohinio estas seninteresa. Vere, la dua parto, en kiu la aŭtoro kun akra satiro kritikas kaj primokas la stultecon de la behinoj, estas pli interesa, kurioza ol la unua. Sed, kiel li povus priskribi pli interese tiun vivon, kie ne ekzistas la koncepto "interesa"?

Se la unua parto estus pli dezirinda, pli interesinda, Gulliver certe restas inter la hinoj, kaj la dua parto, la vivo de la behinoj jam fariĝus senbezona. Se Gulliver post tio ĉi transiras al la behinoj, la leganto povas pensi tiel, ke ili estas la hinoj, kaj la behinoj estas aliaj, iakaŭze primitivaj, senkulturaj popoloj. Szathmári volis montri al la homo nur la celon, kaj ne volis doni ilojn al la atingo de la celo. Laŭ li antaŭ la homaro staras du ebloj: ĉu la vivo de la hinoj, ĉu tiu de la behinoj.

La hinoj ne konas la monon. Neniu ricevas salajron. La varoj kuŝas en la magazenoj, kiel publika rabaĵo, el kiu ĉiu forportas tiom multe, kiom li volas. Gulliver diras: "Mi povas aserti, ke por miaj Eŭropaj okuloj estis tre stranga vidi tian socion, kies ĉiu membro estas riĉa, ne havante unu pencon. Kvazaŭ la tuta socio estus unu familio sen financaj problemoj, sen skribitaj reguloj, sen limita teritorio, sen zorgoj pri la postenoj." (Samloke, 61.p.)

Ni povas ekkoni la vivon de la hinoj el la interparoladoj de Gulliver kaj Zatamon. Laŭ mia opinio, en liaj interparoladoj kun Zolema kaj Zatamon estas la arta malperfektaĵo de la verko.

Zolema kaj Zatamon parolas kaj argumentas bone, kompreneble, klare kaj logike. Gulliver restas ĉiam malsupre en la diskuto, li parolas mallerte kaj tiel en la legantoj ekestas la penso: ĉu Zolema kaj Zatamon pravas?

La hinoj ne havas historion. Ĉiu rememoras nur la tempon travivitan de si mem. El la prauloj postrestas por la idoj nenio krom kion ili kreis, ia nova kemia procedo, konstruaĵo, maŝino, sed pri ties eltrovinto neniu scias. Ĉi tie la vivo ne okazas, sed simple estas. Ili ne havas ekonomian sociordon, filozofion, leĝaron, ŝtatan administradon, religion kaj beletristikon. Ĉio iras laŭ sia vojo.

"Mi devas konfesi, ke la hina vivo havas ankaŭ bonajn flankojn, sed tamen ne ekzistas en Eŭropo tiu senŝanĝa filistro, kiu tolerus tiun medion. Ili vivmaniero rememorigis al mi la distilitan akvon, kiu ja estas pura, sed per la distilado oni forigis el ĝi ankaŭ la salojn, necesajn por la vivo. Oni trinkas kaj trinkas, kaj ĝi ne kvietigas la soifon. Min tedis vagadi sur la senornamaj, dezertaj stratoj, en kiujn ne alportis variecon statuo, kolono aŭ almenaŭ portalo. Montrofenestron aŭ reklamon ili ne konas, kaj tiuj tute ne havus tie celon. Teatro, kino, gastejo, dancejo ne ekzistas. La alkoholon ili konas nur, kiel medikamenton." (Samloke, 111-112 p.)

"Ĉi tie nenio okazis. Ne estis amiko, malamiko, ĝojo, malĝojo, rango, riĉulo, malriĉulo, kreado, progreso, do per unu vorto: variec. Ni diru jene: vivo. Ĉar kio alia estas la vivo, ol diferenco inter la hieraŭo kaj hodiaŭo, kiam oni atendas ion de la morgaŭo. La ekhalto kaj stagno estas morto.

Mi estis tute sola. Nek en la laborejo, nek sur la stratoj iu min alparolis.

Mi kuradis tien-reen, kiel la sovaĝa besto, fermita en kaĉo, serĉante vivon, aeron. Mi staris tie, en la plej granda karcero, ĉar vane mi estis libera, se la aero ne estis libera ĉirkaŭ mi. Mi velkadis senamike, malplene, en la lando de la nenio." (Samloke, 114-115 p.)

Estas tre interese, kiel skribas la aŭtoro pri la rilato inter viroj kaj virinoj: "Vekiĝis mia deziro kaj anakŭ krome mi devas ankoraŭ naski du infanojn. Ĉu vi estas kapabla por seksa laboro?" (Samloke, 120.p.) Laŭ la opinio de Szathmári tia estus la natura homa konduto inter viro kaj virino.

Gulliver parolis al Zolema pri la amo, pri la anima kunulo, ktp.:

"Do ĉe vi - se iu virino honeste kaj sincere alvokas la preterirantan viron por seksa laboro - vi - anstataŭ ŝin kontentigi laŭ la reala vivo de la estanta mondo - paroladas al ŝi pri 'koro', 'amo', 'anima kunulo' kaj pri aliaj malice elcerbumitaj brutajoj - diras Zolema." (Samloke, 129. p.)

Ĉe la ĥinoj la amo tute ne ekzistas.

"Mi petis, ke ŝi, se ŝi jam ne konas la amon, almenaŭ faru por mia bonstato tion, kio estas farenda en tiu okazo. Ŝi karesu, brakumu min kaj ĉefe ŝi ne serĉu alian viron. Responde ŝi demandis, kial mi nomas la amon kunsento, se mi ŝin volas ne apogi, sed malhelpi en la vivo. Konklude ŝi opiniis, ke se ni en Eŭropo tiel kondutas al la amata virino, tiam la neamatan ni verŝajne malhelpas en ĉiu seksa laboro." (Samloke, 132.p.)

Zolema parolas pri tio, ke la laboron de la homo oni devas respekti dum lia vivo, kaj ili respektas ĝin tiel, ke ĝin rekompencas per bona nutraĵo, loĝejo, vesto kaj komforto. Zatamon kaj Gullivero konversacias jene pri la vivo:

"La negativa vivo estas la morto. Kaj ĉu ne finiĝas per tiu ĉiuj viaj penadoj? Ĉu el viaj rakontoj ne rezultis ĉiam, ke por la religio, por la standardo, por la amo, por la belo, do, por la vortoj oni devas ne vivi, sed morti? Sed por la konstruo de la domoj oni devas vivi, kaj mortinto ne povas rikolti la grenon de la kampoj.

- Kial laboras vi? - demandis Gullivero.

- Por la vivo. Sed vi por la luktado. La celon vi puŝas ĉiam

pli malproksimen, ĉar vi vivas ne por ĝi, sed por la luktado!"
(Samloke, 146.p.)

Ĉi tiuj pensoj tute identas al tiuj de Madáčh.

Gulliver ne povis plu vivi inter la hinoj kaj li deklaris, ke li sentas sin en tute "senespera" stato kaj postulis, ke li estu portota inter la behinojn.

La behinoj

En la dua parto la aŭtoro prezentas la behinan kolonion. La behina socio estas groteska spegulbildo de nia estanta socio. La dua parto estas murda satiro, kiu primokas ĉiun gravan motivon de nia vivo.

Ĉi tiu satiro kritikas la absurdaĵojn de la homa socio ĝenerale, tiujn, kiuj elformiĝis en la klassocioj, tamen unuavice en la kapitalismo. Kompreneble, ĉar la realaĵo de la kapitalisma Hungario donis al la verkisto la travivaĵojn.

La baza hipotezo de Szathmári: la kaŭzo de la homa malfeliĉo estas la konkursa instinkto.

"Se du prahomoj vidis sur la arbo unu pomon, la pli forta aŭ pli lerta el ili mortbatis la alian kaj manĝis la pomon. Tio estis tute normala en tiu epoko, ja la interhoma batalo estis la bazo de la ekzisto. Sed nun ni havas ne nur unu pomon, sed tiom, kiom ni volas produkti! Sekve la interhoma batalo ne estas bazo de la homa ekzisto, eĉ ĝi malhelpas la ekziston kaj evoluon, kies bazo estas la kunlaboro." (Hungara Vivo, 4/1973, p.2.)

La forton de la akra satiro plialtigas tiu fakto, ke la absurdaĵojn de la homa socio la aŭtoro ne grandigas, simple starigas ilin en la nekutiman lokon. Ekzemple: la samkarakterajn vivfunkciojn anstataŭas unu kun la alia. Li traktas la manĝadon, kvazaŭ ĝi estus seksa agado. Gullivero demandas de la behino:

" - Diru: kiel oni kutimas ĉi tie manĝi? Kiel vi ricevas la manĝaĵon?

Li terure ekstremis. Siajn manplatojn li metis sur sian buŝon kaj angore ĉirkaŭrigardis.

- Pst! Ne diru tian bivagaĵon! Vi devas diri: "Kiam kaj kiel ni ricevas la spiritalaĵon?"

- Spiritalaĵon? Ĉu ĉi tie oni ne manĝas?

- La spiritalaĵo estas la sama, kion vi demandis, sed tiel diri estas malpermesate, ĉar tio estas kave.

Mi vidis, ke ĉi tie oni rajdadas nur kretene kunportitaj vortoj: antaŭ ĉi tiu vorto oni humiliĝas, de la alia naŭziĝas, sed la ĉefa kvalito de ĉiu vorto estas, ke ili havas nenian interrilaton al la realo." (Dua parto, 165.p.)

Zemŭki kaj Gulliver interparoladas tiel:

" - Se oni diras, pricc-prucc, vi devas rediri tion kaj meti vian fingron sur vian nazon, kaj tio estas la belki. Kaj la belki estas ketni. Se vi ne faros tion, vi ne kondutas ketni-maniere, kaj oni kompreneble enoos pri vi.

- Kaj se mi diras 'pricc-prucc'?

- Tiam oni ridetas kaj gratas vian postaĵon, post kio vi regratas lian. Tio signifas, ke vi ambaŭ ne enoas unu pro la alia kaj vi ambaŭ estas ketniaj homoj." (Samloke, 160-161. p.)

" - Kaj kio estas la bilevo?

- Ĝi signifas, ke ĝia portanto estas betiko.

- Kio estas la betiko? Kion li faras?

- Nenion! Betiko! Kaj la betiko estas elak! Ĉu vi komprenas?" (Samloke, 163.p.)

"Kion signifas la vake, elak, betik, bilev, lamik, borema, boeto, bivag, tion mi nek tiam, nek poste eksciis, vane mi demandis. Ankaŭ ili tute ne sciis.(...) Ĝuste tio karakterizas iliajn vortojn, ke oni ne nur ne rajtas pridubi ilian verecon, sed eĉ pri-pensi estas malpermesite. Oni devas nur kredi, sed ili ofte eĉ ne

diras, kion kredi, nur kredi. La situacio forte rememorigis min pri niaj frenezulejoj - diris Gullivero." (Samloke, 171.p.)

La aŭtoro metas al la pilorio ĉiujn niajn sentojn kaj ideojn. Estas ridinde, kiam la behinoj truas kaj tranĉadas ilian vestaĵon, ĉar nur tiel ili povas ĝin uzi, ĉar tiel estas kipu (bela). Sed ni ne ridas, kiam ni vidas la ridindajn preskaŭ neuzeblajn modartiklojn.

Ni konsterniĝas, ke la behinaj virinoj kovras iliajn buŝojn, kaj al ili ne estas permesate konfesi, se ili deziras la manĝaĵon: sed ni certe ruĝiĝus, se iu virino petus de ni sian kontentigon. - La aŭtoro ironias la tutan socian vivon. Post niaj konvencioj li kritikas niajn pensojn, simbolojn kaj ideojn.

Szathmári ne kredas je la sociaj reformuloj. En la luktado de la du partioj (flavoreluloj kaj bluoreluloj) li volas prezenti la konflikton de la liberalaj kaj la konservativaj partioj, kaj li diras, ke ne estas elirejo el la kaoso. Efektive ambaŭ partioj faras la samon.

Li prezentas, kiel el la behinoj eruptas la furiozatako, nomita bukuo (milito). Gulliver preskaŭ fariĝis ties viktimo. Kiel en la unua parto de la verko, Szathmári akresone kritikas kaj primokas la militon, kaj la deziron de potenco kaj mortigo de la homoj.

"La furioziĝo, nomita bukuo, pri kio mi jam ofte aŭdis, sed mi ne povis kredi ĝian realaĵon, nun fakte eruptis inter ili.

- Vi ekprenas tiun - kaj li enmanigis la mittranĉilon, - vi venas kun mi al la monteta deklivo, kaj tie vi certigas la pacon kaj civilizacion.

- Kiel?

- Ke vi pikas la kemonulojn kaj ili pikas vin.

Post kelkminuta marŝado ekaperis la monteto, kaj tuj frostiĝis la sango en miaj vejnoj pro la ekvidita teruraĵo. Surmonte la konanoj kaj kemonanoj tranĉilsvinge kaj ŝaŭmbuŝe kuregis unu al la alia, kaj baldaŭ dolorigis miajn orelojn la sovaĝbesta hurlado de la furiozuloj el la tuta frenezulejo. La malsanuloj senbride piedbatis, ŝiris, pikis kaj tranĉis unu la alian, kaj neniu ekzistis por haltigi la buĉadon!" (Samloke, 274-275.p.)

La aŭtoro ironias la hipokritan konduton. (Samkiel en la unua parto la konduton de la itala ĉefpastraro.)

Zemoki miras:

"Kiel? Ĉu eble volus resti en vivo, kiam vi havas okazon morti en la bukvo per tranĉilo? Ĉu vi preterlasus ĝui la gracon de la tranĉilo, la plej ĉefan ĝojon, por kiu sole estas inda naskiĝi?" (Samloke, 275.p.)

Sed por la realaj celoj oni devas vivi.

Kaj kiel opinias la verkinto pri la revolucio?

Ĉe la behinoj ne okazas revolucio, kvankam ili havas profetojn. La profetoj anoncas la regadon de la sobra menso. Kiam la behinoj vidas, ke ili pensas serioze tion, kion ili anoncas, la behina socio neniigas ilin.

Poste la behinoj kanonizas la profetojn, kaj en la nomo de la profetoj plu mortigas unu la alian.

" - La bikruo (profeto) estas la plej betika betiko.

- Do, ĉu li estas homo?

- Li ne plu vivas, sed vivis.

- Kaj kial vi nomas lin la plej betika betiko?

- Pro liaj senlime saĝaj instruoj.

- Kion li instruis?

- Tion ke la tranĉilpiko ne estas ĝojo, sed sufero, ke ni naskiĝis por la vivo kaj ne por la morto, kaj tial estas malpermesite piki. Li diris, ke ne ekzistas betiko, sed ni ĉiuj estas egale homoj, ke ne la flava ŝtonero nutras, sed la spiritalaĵo, kiun la bikruo nomis manĝaĵo kaj ke kiu forprenas tiun de la aliaj, vane portas la bilevojn, ĉar li estas vere nur hipokritulo kaj poŝtelisto. Li diris, ke ni devas vivi en paco, trankvilo kaj feliĉo, sen behaĵoj.

Mi ne volis kredi al miaj oreloj.

- Ĉu fakte vivis tia homo, kaj vi ne ĵetis lin sur ŝtiparon?

- Nu...Nu...kio koncernas ... ni fakte ĵetis lin tien, ĉar tiam ni ankoraŭ ne komprenis lin, sed post lia glora martira morto ni ĉiuj akceptis liajn instruojn, kaj de tiam ni ĉiuj vivas laŭ lia spirito.

- Tial do vi tenas sub viaj akseloj la flavan ŝtoneron? Tial do la manĝaĵon vi forprenas de la malsatulo? Tial do vi pikas la ke-monanojn? - mi demandis konsternite.

- Ĉion ĉi ni faras por lia gloro kaj defendo.

Mia spirado nun ekhaltis. Mi kredis, ke mi sonĝas.

- Sed diru, malfeliĉulo, - kial do vi faras ĉiujn ĉi abome-naĵojn?

- Por la defendo de la bikruo, por ke ni efektivigu liajn dok-trinojn." (Samloke, 277-278.p.)

La vivo de la behinoj estis absurdo per si mem. Ilia vivo same ne havis sencon, kiel iliaj vortoj kaj penadoj.

"Mi nur bedaŭris, ke mi lernis tian aferon, kion mi ne povas utiligi por mia patrio. Unue, ĉar la behina malsano estas nekuracebla, due, ĉar ĉe ni feliĉe ĝi ne troviĝas." (Samloke, 301.p.)

Jen la respondo de Zatamon:

"Vi ne rekonis vian propran medion inter ili, ĉar via kulturo diferencas de la behinoj laŭ la formo. Ilia vivo pereigas sin per aliaj vortoj ol la via, kvankam ambaŭ estas samaj: la behineco. Aŭ ĉu ne, vi mem diris iam al mi, ke la esenco de la vivo ne estas la hospitalo, fabriko, pano, sano sed la animo?...Kaj neniam vi ekvidos vin mem. Vi ĉiuj ne havas intelekton. Atavisma, transira raso, kiu antaŭe devas sin elimini el la estanta mondo, por ke la kazoo povu evoluigi la harmonian rasformon." (Samloke, 302.p.)

Konkludo

La filozofio de Szathmári esence estas pesimisma. Sed la tuta romano, nome la influo de la verko en la pensantan leganton tamen ne estas tia.

La fundamenta tezo de la aŭtoro estas: la homaro ne povas esperi la feliĉon kaj la perfektan estadon ĝis tiam, se ne ŝanĝiĝos la biologia strukturo de la homo. La homa instinkto, la konkurinstinkto, ekde la praepoko ne ŝanĝiĝis, la homaro luktis ne por ekonomiaj celoj, sed por la luktado mem.

Szathmári eraras, kiam li asertas, ke niaj vivinstinktoj estas la samaj, kiel la instinktoj de la prahomoj. La homaro multe evoluis dum la historiaj epokoj, sed nediskuteble, ke la evoluado de socia konscio postrestis la teknikan-ekonomian evoluadon.

Szathmári antaŭvidis la progresojn de la scienco, antaŭvidis la uzadon de superevoluita tekniko. Li bone vidis, ke la bazo de la homa ekzisto povas esti nur la kunlaboro.

Maria BERECKZI